

Bona Espero



Cirkulero 63

por la amikoj kaj subtenantoj de Bona Espero r.a.

Dezembro 2004

prezidanto: Otto Nelken ★ Hirschfeldstr. 6 ★ D-59581 Warstein

☎ +49-(0)2902-57460 ★ ☎ +49-(0)2902-911323 ★ ✉ u.nelken@t-online.de

Karaj amikoj,

ĉiujn jarojn denove venas i.a. ankaŭ nia kristnaska rondletero kaj kiel jam antaŭe el diversaj perspektivoj. Komencas Ursula Grattapaglia:

“Dum sinjoro Kaŭamura instruas la sekretojn de la japana te-ceremonio al la pli grandaj infanoj, sinjoro Tanaka instruas kaligrafion al niaj pli junaj infanoj, mi klopodas sendi kelkajn lastajn informojn pri la vivo en Bona Espero.

Estas decembro, printempo, kristnaska festo atendas, la bultenojn de la tuta lernojararo 2004 estas scivole atendataj, la infanoj revas pri donaco, pri kristanaska arbo kaj noktaj koloritaj lumoj....

Dume la plenkreskuloj en Bona Espero klopodegas realigi ĉies revojn, organizi la festojn, akcepti voluntulojn kaj orientigi ilin. Ne facila tasko!!

Laste alvenis Mathias Delmose el Danlando kaj Hirujuki Ilda el Jokohama.

Dum la unua tre bone regas esperanton, la dua venis por lerni flue paroli.

De tri tagoj estas kun ni du estraranoj de EPA, Esperanto Populariga Asocio, de Oomoto en Japanio. Ili instruas al niaj entuziasmaj infanoj japanajn artojn kun eĉ notinda sukceso.

La 15a estas granda naskiĝtagreveno. Vi certe pensas de nia Mastro Ludoviko Zamenhof.

Jes, vi pravas! Sed ankaŭ de la kvina spirita Majstrino Kurenai de Oomoto. Kia belega koincido.

Kaj tiu grava personeco alvenis antaŭ kelkaj tagoj Brazilon por inaŭguri la Internacian Centron de Oomoto en Brazilia. Kaj estas ŝia deziro festi sian naskiĝtagon en Bona Espero kun la infanoj [kie ŝia organizaĵo subtenis projekton grandanime].

Ni jam preparas grandan feston! Kantojn, teatraĵojn kaj.....bonajn manĝaĝojn.

Sed nun mi ankaŭ parolas pri kelkaj problemoj, kiujn ni devas alfronti en nia ĉiutaga vivo kun la infanoj.

Kiel vi jam scias, de pli ol du jaroj vivas kun ni du fratinoj, *Alenes* kaj *Alanes*, nuntempe 14 kaj 16 jaraĝaj, forlasitaj de siaj gepatroj. La juĝisto ilin "donacis" al ni.

donacokonto:

konto-numero 26 484 ĉe Sparkasse Meschede
(BLZ / bankkodo 464 510 12)


kasistino:

Dagmar Rahn ☒ Hirschfeldstr. 3 ☒ D-59581 Warstein
☎ +49-(0)2902-700330, ☎ +49-(0)2902-700328 ✉ dagmar@rahn76.de

En oktobro 2002, ni rifuzis preni ankaŭ la pli aĝan fratinojn, tiam 15jara, ĉar ŝi jam vivis en la "dolĉa vivo de alkoholo, drogoj kaj multa sekso". Ni ne havis kontakton kun ŝi dum la jaroj, sed subite en septembro ĉijare ŝi aperis nokte, piede kun eta knabineto kaj la propra patrino, kiu iam aperis ĉe tiu plej aĝa filino por helpi ŝin naski la bebon.

Kiel ni povus forsendi ilin tri? Nu, ni nur forsendis la patrinojn kaj tenis *Lucivania* kaj la etan bebon, cetere tre ĉarma kaj inteligenta, sed terure nezorgata kaj vere priplorinda. Eĉ naskiĝdokumenton la bebo ne havis.

Venontan tagon mi tuj iris al la juĝisto, farigis naskiĝdokumenton kaj *Lucivania* indikis la nomon de iu junulo kiel patron. La prokuroro vokis lin por fari



analizon de DNA de la tri kio okazis pasintan semajnon. Li volas havi la bebon kaj daŭre telefonas por minaci nin. Li estas toksikodependa de fortaj drogoj kaj la patrino tre timas lin kaj ankoraŭ la historio ne estas finita.”

Sed nun ni ŝatas doni la parolon al 14 jaraĝa knabino:

“Mi estas *Alanes* kaj vivas en Bona Espero de pli ol du jaroj. Estas la unua fojo, ke mi skribas por ĵurnalo! Granda emocio.

Mi estas nun tre feliĉa, ĉar ne nur mia fratino *Alenes* de 16 jaroj vivas kun mi en Bona Espero ek de oktobro 2002, sed nun alvenis nia pli aĝa fratino kun sia bebo kun la stranga nomo *Galaxia*.

Galaxia estas tre bela kaj ĉiuj en Bona Espero dorlotas ŝin. Ŝi jam parolas tri vortojn kaj havas 16 monatojn da vivo. Sed ofte forkuras kaj subite aperas en alia domo.

Mi frekventas la 6an klason kun *Alenes*, *Tamara* kaj *Leorraine*. Ni estas la plej sukcesaj lernantoj.

En januaro ni eniris la 5an klason, sed ĉar ni havas la plej altajn notojn, la direktorino en aŭgusto metis nin en la 6an, kaj en januaro ni eniros jam la 7an klason! Ni estas tre kontenta, ĉar inter 2002 kaj 1999 ni tute ne iris al lernejo, ĉar nia patrino ka nia patro vagadis kun ni ĉie kaj ne sendis nin al lernejo.

Hodiaŭ vespere nia instruistino *Ada* portos nin al Alto Paraiso, kie ni dancos antaŭ ĉiuj instruistinoj de la urbo, pli ol 60, por festo homaĝi la sekretariinon de Edukado de nia regiono.

Pasintan semajnon ni dancis en nia lernejo antaŭ pli ol 500 niaj gekolegoj kaj gepatroj. *Onklino Ursula* fotis kaj sendos foton al vi. Mi vere ege ŝatas danci kaj hieraŭ vespere la japanaj gastoj multe aplaudis nin.

La spirita gvidantino de Oomoto estas tre bela sinjorino kaj ni lernis faldi paperojn kaj oferti la ceremonion de la teo. Ildete estis la plej kapabla kaj mi estis asistantino.

Ni prezentis la historion de Zamenhof, kiam naskiĝis esperanto en 1878, "la vendistino de revoj".

Mi salutas al vi kaj nome de miaj gefratoj en Bona Espero ankaŭ al ĉiuj amikoj en Eŭropo!
Alanes Bernardes Rodrigues"



Ĉiam denove ni aŭdas entuziasmajn raportojn de junaj - sed ankaŭ pli aĝaj - homoj el la tuta mondo pri ilia tempo en Bona Espero. Jen unu pri somera staĝo:

"Saluton el Emden! Mi nomiĝas Sebastian Kirf kaj studas socialan laboron / socialan pedagogion. Por mia studo mi devas fari du staĝojn. Mia dua staĝo estiĝis tre malkutima, ĉar dum somero de tiu ĉi jaro mi pasigis 2,5 monatojn proksimume 11.000 km for de mia hejmo: En Brazilo!

Post travivaĵplena alveturo tra Frankfurto – San Paŭlo – Brasilja mi atingis je la komenco de julio Bonan Esperon, la almenaŭ en Esperantaj cirkloj ofte citata paradizo ene de la "nenio". Fakte estiĝis paradiza staĝo.

Dum mia unua monato tie la plej multaj infanoj feriadis kaj estis hejme. Kun la restintaj dek mi tre bone interkomprenis post mallongega tempo, same kun Ursula, Giuseppe, la instruistino Ada, la du kunlaborantoj Orlando kaj Armindo kaj la kuiristino Lindomar. Grandan parton de mia tempo mi dediĉis al la bieno: Muroj estis purigenda kaj farbenda, elektraĵoj estis riparenda, la komputilo por la infanoj estis funkciigenda kaj, plej grave, la plantoj estis akvumenda. Dum la lerneja tempo krome mi instruis ĉiutage la infanojn en Esperanto kaj kelkajn mi lernigis krom tio legi muziknotojn kaj muziki per kibo [elektrona piano] – se ni ne ludis kune aŭ faris ekskurson.

Krome mi ricevis danke al Ursula kaj Giuseppe multajn interesajn informojn pri la vivo kaj la socio en Brazilo kaj ankaŭ pri la laboro en kaj la historio de Bona Espero.

Je la fino de mia restado mi produktis filmon kune kun la infanoj pri Bona Espero. Tiun mi povis uzi, denove en Germanujo, ne nur por doni al miaj kunstudentoj vivantan impreson pri Bona Espero, sed mi ankaŭ uzos ĝin por prezenti Bonan Esperon je Esperanto-renkontiĝoj, ĉar ĝi estas tute farita en Esperanto kaj aldone havas germanajn subtitolojn.

Resume mi povas diri nur, ke estis mirinda vojaĝo (kompreneble pro Esperanto), ke mi havis bonegan tempon en Bona Espero kaj ke mi tre esperas denove veni al Brazilo por reviziti Bonan Esperon. Kaj mi deziras al ĉiu la oportunon, almenaŭ unufoje esti ĉeestinta en Bona Espero.

Rimarkinde estas cetere ankoraŭ, ke mi ricevis financon subtenon por la vojaĝkostoj de la Germana Akademia Interŝanĝo-Servo sub oficiala indiko de Esperanto kiel uzata interkomprelingvo."

En 2004 entute pli ol 40 gelnantoj estis matrikulataj, kaj la infanoj de Bona Espero estis denove ege sukcesaj en la lernejo. Lindomar kaj Armindo iĝis valoregaj gehelpantoj, kaj la kunlaboro kun Orlando kaj Ada tre harmonias. Finfine mian sinceran koran dankon unufoje pli al ĉiuj malnovaj kaj novaj subtenantoj, sen ties grandioza helpo ĉi-tiuj rimarkindaj sukcesoj tiamaniere ne estus penseblaj. La novajn amikojn mi salutas speciale, kaj al ili same kiel al la multaj aliaj mi deziras

*benitan kristnaskfeston
kaj pacan, sukcesplenan jaron 2005!*

Oto Vell